


Novaj vojoj de lernado

Inter la 17 celoj difinitaj de UN por la daŭropova evoluo dum la periodo 2015-2030 (*Esperanto*, Novembro 2015, p. 230) gravan lokon okupas edukado. Precipe grava por ILEI kiel asocio de edukantoj estas la 4-a celo:

Garantii inkluzivan kaj egalecan, bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancon por tutviva lernado.



Tio estas kion ILEI laŭdifine rekte atentis, aŭ devus atenti, en siaj agadplanoj kaj aktivajoj. Ankaŭ la celoj 5 (egaleco inter la seksoj, virinaj rajtoj), 10 (redukti malegalecon ene de landoj kaj inter landoj), 16 (konstruado de pacaj kaj inkluzivaj socioj por daŭropova evoluo) kaj 17 (realigaj kapabloj, tutmonda partnereco) estas proksimaj al la laŭstatutaj celoj kaj program-orientiĝo de ILEI. La ceteraj 12 celoj de UN, kiuj rilatas al forigo de malriĉo kaj malsato, garantio de sano, akvo, energio, ekonomia kresko, infrastrukturo, batalo kontraŭ klimatsanĝiĝo, prizorgo de oceanoj kaj maroj, protekto de ekosistemoj k.c., ne apartenas al la agadtereno de ILEI. Tamen, la E-komunumo per sia informa agado povas helpi vastan konsciigon pri ilia graveco kaj popularigadon de planoj kaj atingoj de ilia realigado.

E-lernantoj en la centro de atento

Ni revenu al la *bonkvalita edukado kaj tutviva lernado* el la 4-a celo. Ĝi signifas adekvatajn kondiĉojn kaj rimedojn por lernado, egalece kaj juste alireblajn al ĉiuj bezonantoj. La teknologio, precipe IKT (inform-komunika teknologio), ekipis la modernan pedagogion per potencaj rimedoj por kreado, disponigo kaj uzado de lernmaterialoj. La E-kursoj kaj lernfaciligaj materialoj ĉe, ekzemple, lernu.net, edukado.net kaj duolingo.com montras kiel la pedagogio de E-o akceptas kaj utiligas lernteknologiajn novaĵojn.

Kun la instrutekologia evoluo, tirante unu la alian antaŭen, evoluis kaj draste ŝanĝiĝis didaktikaj aliroj al la edukado: la roloj kaj interrilatoj de lernanto kaj instruanto ŝanĝiĝis, la intereso kaj bezonoj de la lernanto estas

en la fokuso, interkultura edukado fariĝis esence grava en la epoko de tutglobiĝo, eksterinsti-
tucia kaj neformala kler-
iĝo forte evoluis, kaj la
tutviva lernado fariĝis
konsista parto de la ĉiu-
taga vivo.

Ĉio ĉi signifas *novajn
vojojn de lernado*, kiujn
priantentis la 49-a konfe-
renco de ILEI tra diversaj
formoj de la konferenca
programo, inkluzive de la



Interkona frandvespero en Oostende 2015

Simpozio pri la konferenca temo. Konforme al la Jaro de Lernanto, proklamita en la Strategia Laborplano de UEA, la E-lernantoj estos en la centro de atento. La tuta programo estos markita per tiu konferencema orientiĝo.

Faka programo

La populareco kaj sukceso de la kurso por komencantoj kaj instrutreja seminario dum la 48-a konferenco en Oostende signifas kuraĝigon al ILEI por plivastigo de la konferenca programpropono al E-lernantoj kaj instruantoj: kursoj por komencantoj, komencintoj kaj progresintaj gramatikemuloj, instrutreja seminario kaj seminario pri E-kulturo kaj interkulturo, ĉio en moderne ekipitaj prelegejoj de la Altlernejo de Nyíregyháza.

ILEI precipe alvokos lernantojn de duolingo.com kaj lernu.net por sperti la lingvon ĉeeste en Nyíregyháza. Kaj ILEI invitas siajn agantojn kiuj pretas venigi grupon al iu el la kursoj kaj seminarioj, aŭ mem prelegi, aŭ gvidi diskutrondon aŭ fakgrupon pri iu temo, sciigu tion al la estrarano pri konferencoj por interkonsenti kaj plani konkrete.

Kultura, distra kaj turisma programo

La tradiciaj *Interkona frandvespero*, *Nacia*, *Internacia* kaj *Adiaŭa vesperoj*, *Lingva festivalo* kaj *Konferenca bankedo* estas siaspecaj identigiloj de la konferencoj de ILEI. La diligenta kaj entuziasma LKK en Nyíregyháza planas aldoni *Konferencan balon* al la vespera programo. Por la junaj konferencanoj kaj ĉiuj kiuj sentas sin junaj, ni planas noktan amikan kaj muzikan programon kaj sportajn posttagmezojn.



Lingva festivalo: la tetuna lingvo el Orienta Timoro (2015-07-21)

Ĉirkaŭa parko, aŭ en proksimaj tipe hungaraj restoracioj.

La turisma programo per duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj konigos al la konferencanoj la urbon mem, la proksimajn sal-lagan bankuracejon, bestĝardenon kaj etno-vilaĝon, kaj iom malpli proksimajn regionojn de Tokaj kun la famaj vinkeloj kaj regionon kie situas la Muzeo de Kolomano Kalocsay.



El etnovilaĝa muzeo ĉe Nyíregyháza

Pliajn informojn vi povos legi en la konferencaj paĝoj www.ilei.info/agado/konferencoj.php kaj en la aparta konferenca retejo de LKK: ilei2016.nyirenergy.hu/.

Bonvenon en Nyíregyháza!

Radojica PETROVIĆ, estrarano pri konferencoj